

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1972 5

KULTURAJ KAJEROJ

1972 SEPTEMBRO - OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

ENHAVO

Pri Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Ĉielo-iluministoj

Mirigaj ranoj

Grésillon 20 jara

Ŝakludo dumiljara

La interrompita ŝakpartio E. Jouis

Nia konkurso P. Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

La 20-an de Julio venis al Gresillon la urbaj konsilianoj kaj oficialuloj de Baugé, Pontigné kaj St-Martin-d'Arcé. Ili tiam respondis al la invito de la Esperantista Kulturdomo, kiu deziris celebri la 20-an datrevenon de la malfermo de la kastelo al la tutmonda esperantistaro. Ne grandioza ceremonio, kies celo estis konigi al la « najbaroj » la etoson de Grésillon. Ĉar stranga estas la fakto, ke, kvankam la Esperantista Kulturdomo estas famkonata tra la mondo, la loĝantoj de la najbaraj urbetoj kaj vilaĝoj ne konas ĝin. Por ili Grésillon estas « tiu bieno, kien venas alilandanoj ». Ili scias nenion aŭ malmulton pri la vivo en la Domo. Nun almenaŭ kelkaj « najbaroj » havis la okazon ne nur aŭdi pri la kulturdomo sed propraokule konstati, kiajn ligojn plektas inter la esperantistoj esperanto. Dek landoj estis reprezentataj en mikrokosmo tute unueca. Tion konstatis kaj diris en apartaj konversacioj kelkaj el la oficialuloj. Tiu etoso mirigis ilin. Ĝi ne plu mirigas nin, bedaŭrinde ĉar ni ne plu konscias pri la eksterordinareco de la esperantistaj renkontiĝoj. Feliĉe la geamikoj, kiuj regule revenas al Grésillon montras, ke ili trovas tie ion, kion ili ne trovas en alia loko.

Tiun etoson ĝuis la kelkaj centoj da gesamideanoj, kiuj pasigis en la kastelo sep tagojn aŭ, kiel unu el la restadantoj, sep semajnojn. La Esperanto-kursoj estis sukcesplenaj same, kiel la aliaj kutimaj kursoj al kiuj ĉijare aldoniĝis en aŭgusto foto-arto. Dum la du semajnoj dediĉitaj al 20 jaroj da agado por kaj per esperanto, atentema aŭskultantaro povis aŭdi pri la celoj, atingaĵoj kaj esperoj de pluraj gravaj esperantistaj organizoj. Bedaŭrinde ne ĉiuj invititaj organizoj sendis reprezentanton. La unua studsemajno organizita de la Esperanto-komisiono de la movado « Moderna Lernejo » estis sufiĉe sukcesplena por antaŭvidi dusemajnan studperiodon por la geinstruistoj venontan someron.

Baldaŭ kunvenos la konsilio de la Esperantista Kulturdomo por prepari la venontjaran programon. Jam nun pensu pri viaj 1973 someraj ferioj. Vizitu Grésillon. Petu la programon ek de decembro.



RESTAS NUR KELKAJ TAGOJ

al vi por pagi vian abonon 1972

Vi povos eviti al ni kroman laboron

PAGU TUJ

al

P. BABIN, 13, bd de la Chauvinière

44 - Nantes -- Francujo

p.k. Nantes 2 813-61

(nur per ĉeko)

aŭ al via peranto

Esperanto tra la Mondo ★

PLI OL 900 KONGRESANOJ EN PORTLAND

923 geesperantistoj el 39 landoj ĉeestis la universalan kongreson en Portland malgraŭ la malproksimeco de la loko. Ĉiuj kutimaj eroj eniris la programon (solena malfermo, fakaj kunvenoj, somera universitato, ekskursoj, distraj vesperoj, literatura konkurso, k.t.p.).

La kongreso, debatinte la ĉefan temon « Monda turismo kaj lingva diverseco », konstatis, ke rimedoj kiel samtempa interpretado, praktikata en ekzemple Unuiĝintaj Nacioj, simple ne funkcias por normalaj turismaj bezonoj kaj ke la lingva obstaklo vere malhelpas tiun kreskantan modernan industrion — la turismo. Ĝenerala akcepto de unu sola lingvo por internacia turismo helpus interkonatiĝon de la popoloj kaj plibonigus la vojaĝsekurecon.

La dua temo de la Esperanto-Kongreso estis : « La valoro de fremdlingva instruado en la lernejoj. La partoprenantoj aŭdis plurajn usonajn profesorojn konfesi, ke la instruado de fremdaj lingvoj en Usono estas « totala fiasko ». Malkontento pri la rezultoj de tiu instruado kaŭzis, ke la studenta protestmovado sukcesis grandparte forigi ĝin el la instruprogramo kaj lasis grandan nombron da instruistoj senlaboraj. Aliaj profesoroj priskribis la rezultojn de universitataj kaj lernejaj kursoj de Esperanto, kiu montriĝis lernebla ĝis tre kontentiga grado eĉ en kelksemajnaj intensaj kursoj.

S.A.T.-KONGRESO EN KUOPIO

330 gekongresanoj el 18 landoj kunvenis en Kuopio por la 45a kongreso de S.A.T. Ili povis ĉeesti 4 laborkunsidojn kaj 5 prelegojn pri « Simboloj kaj koloroj », « Socialpolitiko en Finlando », « Signifo de Esperanto », « Fina literaturo », « Kulturo per librolegado ». Diversaj aliaj eroj kompletigis tiun programon.

ALIAJ SUKCESINTAJ MANIFESTACIOJ

— En universitato de Lieĝo, someraj universitataj kursoj arigis kvardekon da gestudentoj pri la temo : « medicinaj sciencoj » kaj « lingvistiko » (10 profesoroj el 8 landoj).

— En Frostavallen (Svedujo), 105 personoj debatis pri : « La problemo de lingva komunikado en la moderna mondo ».

— En Budapeŝto : altnivela « Hungara kulturfestivalo » kun 600 partoprenantoj el 20 landoj. La vic-ministro pri Edukado S-ro P. Polinszky, malfermis ĝin. Memortabulo estis metita sur la estinta loĝdomo de Julio Baghy, la fama esperantista poeto. Dum tiu festivalo, okazis konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

— 250 gejunuloj el 24 landoj partoprenis la Internacian Junularan Kongreson en Torun (Pollando).

— En la Internaciaj feriaj kursoj de Helsingör (Danlando), venis 140 esperantistoj.

— En U.S.S.R., 80 geknaboj el 10 urboj, kunvenis en Tutsoveta Esperanto-Junulpionira Labortendaro

EN 1972-1973, OKAZOS...

— La 58a Universala kongreso de Esperanto, en Beograd (Jugoslavio), sub la alta protekto de Prezidento Tito (28a de Julio — 4a de Aŭgusto).

— 27a de Decembro 1972 — 3a de Januaro 1973 : Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo. Temo : « La manipulata homo » (apud Darmstadt).

— Fervojista kongreso en Aarhus (Danlando), 12-18 de Majo.

EN OLIMPIAJ LUDOJ

Dum la olimpiaj ludoj, en Munkeno, estis disdonita al ĉiu nacia teamo, broŝuron de S-ro Ralph Harry, aŭstralia ambasadoro en Germanujo. Tiu 32 paĝa broŝuro, titolita : « Esperanto, lingvo de sporto », entenas tipajn konversaciojn en angla-esperanta-germana lingvoj pri 21 sportoj.

INFORMADO AL BRITAJ EDUKISTOJ.

Ilustrita, dukolora broŝuro pri la instruado de Esperanto, estis sendita al 8 000 britaj lernejestroj, edukaj instancoj kaj korespondantoj pri edukado de britaj gazetoj, kun letero de S-ro Markarian, direktoro de Duagrada lernejo en Londono.

EN UNIVERSITATO...

Ek de Oktobro, kursoj (kun laborrondo pri esperanta kulturo), estos malfermita en la lingvoscienca instituto de la universitato de Bonn.

DIVERSAJ ELDONAĴOJ

— « Sonĝo kaj maldormo sub la karpeneto » de la jugoslava nobelpremiito Ivo Andriĉ. 13 noveloj tradukitaj de Imbert kaj Tišljan.

— « La Montara Krono », de la montenegra poeto Njegoŝ (1813-1851). Klasika ĉefverko de popola poezio, esperantigita de Petroviĉ.

— « Tagiĝo de la eŭropa medicino en Japanio » de Nishi Seiko.

— « Mi estas Pelé », aŭtobiografio de la fama futbalisto (traduko de Almada).

— « La vojaĝo al Novzelando » de prof. Hori (Japano).

— « Laŭtema vortaro esperanta-angla-franca-hispana » de Ergoto de Bonaero (6 800 vortoj, 90 temoj).

— Ĝis nun Fiat eldonis 10 kolorfilmojn kaj 7 prospekojn en Esperanto

EN ITALUJO

— Bulvardo « Esperanto » en Padova. En Italujo, 37 stratoj ricevis la nomon « Esperanto » aŭ « Zamenhof ».

— Kiel ĉiujare, la « Miela luno » organizita en Rimini de la turisma entrepreno Azienda di Soggiorno kaj de la hotelestroj, akceptis esperantistajn parojn (tiujare 3), inter la paroj de novaj geedziĝintoj invititaj por I-semajna senpaga restado.

EN PORTUGALIO

Post longa periodo de malpermeso, fondiĝis en marto, nova Portugala Esperanto-Asocio. Adreso : ĉe S-ro Adolfo Nunes, Costa do Castelo 70, I°, Lisboa 2.

ĈIELO-ILUMINISTOJ

Jam en la 7-a jarcento, la Ĉinoj posedis la elementojn, kiuj konstituis la tiaman pulvon, uzatan por milito. Pli poste ili imagis ĝin uzi ĉe fajraj spektakloj por celebri la venkojn. Je la XI-a jarcento la Bizancanoj alportis el Ekstrem-Oriento ĝis la mediteraneaj regionoj, la unuajn elementojn de la piroteknika arto. Estas la italoj, kiuj perfektigis tiun spektaklon, baldaŭ konatan en ĉiuj grandaj eŭropaj ĉefurboj : Vieno, Berlino, kaj Versajlo. Kelkaj italaj piroteknikistoj instaliĝis en Francio kaj prezentis sian spektaklon sur la urbaj placoj. La 5 fratoj Ruggieri montriĝis en la Kortego kaj Ludoviko la XV-a ilin nomis « Reĝaj Piroteknikistoj ». La unua granda piroteknikaĵo estis prezentita de la kvin fratoj en la 29-a de aŭgusto 1739, okaze de la edziniĝo de Louise Elisabeth de Francio kun Don Filipo, infanto de Hispanio. Unu el la fratoj, Gaetano, iris en Anglujon. Tie li fariĝis Reĝa Piroteknikisto de Georges la Dua. Li estas entombigita en Canterbury Baziliko. Unu el iliaj posteuloj estis la plej fama piroteknikisto dum la Dua Imperio.

Apoteozo de noktaj festoj estas tiuj kolor-simfonioj, kiujn piroteknikistoj, multe pli artistoj ol teknikistoj, komponas en granda sekreto.

Tia fea, mirinde bela spektaklo disvolviĝas dum malvarmeta vespero sur la ĉielo en rodo de Cannes ; el gigantaj laŭtparoliloj, ankritaj je kelkaj metroj de la bordo, ŝprucas la lastaj akordoj de la Naŭa Simfonio de Beethoven. Je ĉiu takto de la majstroverko korespondas, sur la ĉielo, fantasta luma ekflorado. Estas la fina bukedo de granda piroteknikaĵo dum la Internacia Festivalo ; kiam obskureco kaj silento falas sur la « Croisette » la homamaso mirigita, kvazaŭ ensorĉita, dum momento mutiĝas ; kaj subite eksplodas potenca ondo de aplaŭdoj kaj aklamoj ; ŝajne neutilaj aklamoj, ĉar neniu scenejo, neniu aktoro, neniu enscenigisto montriĝas. Tamen tiuj anonimuloj ekzistas : ili estas la modestaj piroteknikistoj ; la publiko neniam ilin vidas ĉar ili laboras malantaŭ barieroj sekurigaj. Dum la homamaso disiras, ili ne mezuras sian sukceson sur ia aplaŭd-mezurilo ; ili nur forviŝas sian ŝviton ĉar estas terure varme sur la lanĉado- areo ; ili estas nur kontentaj se ĉio, kiel antaŭ-vidite, disvolviĝis. Cetere ili ne havas tempon por revi, ĉar jam nova spektaklo okazos post kelkaj tagoj. Por tiuj ĉi, kiuj ĵonglas per bomboj kaj fuzeoj, la sezono daŭras tri monatojn ; necesas iri de urbo al alia kun provizo da eksplodaĵoj.

« Ankaŭ nia profesio ŝanĝiĝas » diras al ni J.-C. Despeyroux, unu el la patronoj de Lacroix-firmao, kiu de cent jaroj funkcias en Muret, apud Tuluzo. « Ĉio komenciĝas sur papero ; post la somera sezono, kiam ni revenas en niajn laborejojn, ni jam revas pri novaj spektakloj. Ĉar hodiaŭ muziko ĉiam akompanas piroteknikaĵon, estas unue melodio, kiu ĉarmas nin ; kaj, sur papero, ni komponas la paletron de novaj koloroj ».

Georges Tournay, piroteknikisto ĉe Ruggeri malkovras al ni la sekretojn de la eksplodaj miksaĵoj. De du jarcentoj kaj duono la nomo « Ruggeri » famiĝas. En 1739 ĝi jam mirigis « la bonan popolon » de Parizo. « Unue jen senfuma pulvo kaj diversaj kemiaj elementoj (nitrato, magnezio, potaso... kaj ankoraŭ aliaj), kiuj, brulante, okazigas specialajn efektojn. Jen kion diras la artuloj ; sed kion ili neniam konfesas estas ilia propra formulo pri dozado, pri elektitaj bruligaĵoj, pri kunpremo-grado. Kelkaj piroteknikistoj, kiel la iamaj alkemiistoj uzas, oni diras, brandon, amoniakon, kaj kamforon.

Do, la piroteknikisto sekrete laboras, unue en sia skribejo kaj poste en sia laborejo ; pli bone diri en siaj laborejoj ĉar tiuj ĉi kompleksaj miksaĵoj entenas danĝerajn produktojn, kiuj povas montriĝi plej kapricemaj ; leĝera ŝanĝo ĉe temperaturo, ĉe humideco kaj « Krak ! » estas spontana incendio aŭ eksplodo. Tial, la piroteknikisto laboras en betonitaj kazematoj, en kiuj ĉeestas nur 2-3 personoj. Okaze de akcidento, kiu ne estas malofta, vundoj kaj materialaj damaĝoj estas kiel eble plej malmultaj. El tiuj diskretaj blokhaŭsoj eliras, milope, fuzeoj, bomboj, « maronoj », « sunoj », kaj aliaj petardoj, kiuj



konstituos la noktan spektaklon. Eliras ankaŭ la novaĵoj ; tiuj ĉi estas 10,20-fojojn provitaj sur la pafkampo, meze de kamparo. Tial la loĝantoj de Muret kaj Avignon la unuaj ĝuas la mirindajn piroteknikaĵojn, kiujn la urbanoj vidos nur kelkajn monatojn pli poste.

Precizeco ĉe ellaborado de tiu nova Komponaĵo ne estas la nura zorgo. Oni devas trovi por ĝi, la plej taŭgan lokon kaj elekti la muzikan frazon, kun kiu ĝi plej arte harmonios.

Hodiaŭ la publiko ne plu venas por diri : « Ho, la blua bel', ho la ruĝa bel' ! » ; ĝi estas pli postulema ; ĝi deziras belan piroteknikaĵon : la vida kaj sonora spektaklo devas esti unueca, seninterrompa, kaj arte kresĉenda. Aliparte neniu piroteknikisto akceptus prezenti saman spektaklon en Lille, Bordeaux kaj Marseille. Cetere la preferoj de la publiko varias laŭ la regionoj ; la mediteraneoj preferas la koloron ; en nordaj kaj orientaj regionoj la francoj preferas bruon : Des pli tondras, klakas kaj pafkrakas, plibone estas - Principe ĉio estas antaŭvidita ; tamen ĝis la lasta momento la prezentado povas esti fuŝita ; la kaŭzoj ? kelkfoje, pure psikologiaj : ekz : en 1969, pro devoluto-minaco, la municipoj neniigis siajn tradiciajn piroteknikaĵojn.

La piroteknikaĵo estas mendita, la kadro elektita, la programo ellaborita ; kelkajn horojn antaŭ la « prezentado » kamionoj alportas ĉiujn elementojn de la spektaklo ; tio estas, interalie, nekredebla brokantaĵo da bastonetoj, kartonoj, haŭbizetoj, kaj multaj kilometroj da elektraj fadenoj ; ĉiu peco havas sian propran fadenon, kiu kunligas ĝin kun la ekflamig-pupitro. Antaŭ kelkaj jaroj la piroteknikisto, kun torĉo ĉe mano, kuris de peco al alia por ekflamigi ilin, laŭ vico tre precize difinita. Hodiaŭ la ekbruligo estas elektronika. Eĉ, la plej lasta trovaĵo permesas ekflamigi pecon aŭ arojn da pecoj (granda piroteknikaĵo enhavas plurajn milojn da pecoj) pere de magneta bendo. Sur ĝi estas ankaŭ registrita la muzika partituro aŭ la akompanada teksto. « La sistemo tre bone funkcias », diras G. Tournay, « la disflorado de peco koincidas kun tia aŭ alia muzik-noto ; eĉ ni klopodas por ke la eksplodbruaj pecoj anstataŭu la tamburegadon de la orkestro.

Malgraŭ la plej atenta zorgo alportita al tiu muntado, la piroteknikisto povas renkonti malagrablajn surprizojn. Sur la pafkampo oni povas nombri ĝis 8 km. da elektraj fadenoj, kiuj intermiksiĝas kaj kuras al ĉiuj direktoj ; sufiĉas ke, en obskureco, piedo de helpanto alkroĉiĝu ĉe tiu araneeca reto por ke la spektaklo fuŝiĝu, eĉ nur inkandeska kartono povas okazigis katastrofon. Tion oni vidis antaŭ kelkaj jaroj ; la spektaklo estis ĵus anoncita de la 3 eksplodoj, similaj je la 3 frapoj en teatro, kiam la spektantoj estis sufokitaj je mirkonsterno : subite sur la ĉielo kaj sur la lago okazis fantasta brulo akompanata de eksplodoj tiel violentaj kiel artileria pafado. La « pirodramo », kiu devis daŭri duonhoron, estis finiĝinta post tri minutoj ! Kaŭzo ? : falo de brulanta ligno-peco sur elektran kablon. Surdigita, mirkonsternita la publiko bezonis momenton... por kompreni... kaj eksplodis... koncerto da fajfoj kaj huadoj !

Iam ankaŭ okazis, ke manipulanto eraris ĉe muntado de siaj elektraj kunigiloj : la fina bukedo komenciĝis je sia fino : abundo de pafkrakadoj, deflagroj kaj plej riĉaj efektoj lumaj kondukis al kelkaj solaj fuzeoj silentemaj, pli kaj pli malfortaj kaj malsane palaj !

Maltrankvilo

Okaze de tia akcidento la piroteknikistoj estas, kontentaj, kiam neniu estas vundita ; kelkaj el la manipulantoj havas, pro antaŭtempa eksplodo, brulvundojn aŭ mankantan fingron. Tial, ĉeestante spektaklon de kolego, ni tuj maltrankviliĝas, kiam ni ekvidas la lumeton de poŝlampo, kiu translokiĝas sur pontono aŭ sur la pafejo dum la prezentado disvolviĝas ; ni ne ŝatas tion : se responsulo aŭ helpanto forlasas sian ŝirmejon, certe io ne bone iras ; aŭ peco ne ekbrulis, aŭ ekbrulinte, ĝi ne altiĝis ; ĝi riskas perturbi la spektaklon pro netaŭgtempa eksplodo, aŭ bruligante sian haŭbizon, ĝi povas ekbruligi la aliajn ; necesas kontroli kaj la kontrolanto riskas akcidenton.

La vento povas forblovi la fumon al la spektantoj ; ĉe alteco unu blovego sufiĉas por longigi kaj disigi figuron, tamen bone elprovitan ; pluvo nune malpli ĝenas ol antaŭe, kiam la kartonaj kovertoj facile malsekiĝis ; hodiaŭ la plastoj nepermeablaj je akvo, multe helpas al ni.

Kiel aktoroj ĉe teatro dum la Unua Prezentado, ni sentas korpremon ; sed estas granda diferenco : se la artisto povos pli bone roli en la sekvantaj vesperoj, por ni, ne estas ebla re-prezentado.

Enmanigi la publikon estas necesa. Bona uverturo, ekzemple, direktas al ĉielo, sur ritmo de Mozart-menueto garbojn da multkoloraj bomboj kaj garbojn da kometoj kun fajreraj vostoj, kiuj disfloras en plena silento ; kaj subite ĉe la fino de la bildo, serio da potencaj eksplodoj skuas la atmosferon ; ŝajnas ke nenia aliaĵo estas pli bona por degeli la homamason !

Nelonge la manipulanto ĝuas la aplaŭdojn. Jam li metis aŭskultilojn sur siajn orelojn ; unue tiu kasko protektas la orelojn kontraŭ « šoŝo-oj », sibloj, eksplodoj, kiuj rapide sinsekvas je kelkaj paŝoj de li ; ankaŭ li povas kontroli la disvolvadon de la muzika partituro, kiun disaŭdigas laŭtparoliloj ; en sia budo, tre malgranda loko, li samtempe sekvas la ekbruligadon de ĉiu peco ; ĉe ĉiu momento incidento povas postuli rapidan intervenon.

Antaŭ 2-3-jaroj mi akompanis J.-C. Despeyroux en Cannes, okaze de la Internacia Konkurado. La pirokomedio, kiu estis la franca prezentado, bone komenciĝis ; ŝirmitaj en nia budo, kun aŭskultiloj sur la oreloj, ni fidis la magnetan bendon, kiu aŭtomate ekbruligis ĉiun pecon. Subite mi vidis la vizaĝon de Despeyroux malheliĝi ; sur lia buŝo mi divenis energian blasfemon ; sammomente li kliniĝis sur la multaj lumaj vidiloj de sia pupitro, li febre puŝis ŝaltilojn, turnis mantenilojn, rapide malkonektis la ekbruligadon per magneta bendo, kaj ĝin mane funkciigis dum 20 minutoj. Fine la lastaj akordoj de la Naŭa Simfonio plej grandioze akompanis la lastan vastan iluminaĵon. S-ro Despeyroux klarigis : « la posttagmeza pluvego lasis en la aero multe da humideco : konsekvence la ekbruligado de la pecoj okazis kun malfruo je 1/10 de sekundo ; se mi ne intervenus ni havus, ĉe la fino de la spektaklo, la plezuron rigardi niajn fuzeojn disflori en tuta silento dum... 5 minutoj. Mi preferis interveni ». Li majstre estris la aferon !

Li simple konkludas : « Estas la riskoj de la metio ! ».

MIRIGAJ RANOJ

Plej bizara estas la rano-popolo ! Plej diversaj ili estas : jen la eta rano de Kubo, ne pli granda ol la ungo de polekso ; la Goliat-rano de Kameruno, kiu pezas 6 kg. kaj kies femuroj estas dikaj kiel ŝaf-femuraĵoj ; la arba rano de Borneo, kies membranoj kunligantaj fingrojn kaj piedfingrojn rolas kiel paraŝutoj. Jen ankaŭ la katolika rano, kiu havas nigran krucon sur la dorso ; la Brazila « Hyla velunosa », kiu povas fali el 40 metroj sen ricevi eĉ unu ĝibon ; kaj la paradoksa rano, kies ranido estas 4-foje pli granda ol siaj gepatroj.

En iu tago de 1875, la fama biologo Lazzaro Spallanzani imagis elpreni la pulmojn de rano por vidi, kio okazos. Nu, nenio okazis ! la senpulma rano daŭrigis salti kaj kapti muŝojn kiel antaŭe ; kun aliaj ranoj estis same ; neniu el ili ŝajnis senti tiun subtilan sanĝon en sia anatomio. Spallanzani tiamaniere esprimis la rezulton : « ĉe rano, absorbo de oksigeno ŝajnas esti efektivigata de la haŭta organo ».

De tiam oni malkovris la Ranon de Kameruno : la masklo, dum amoro-periodo ornamiĝas je vilaj karnaj tuberoj, nur epidermaj ; ili duobligas la haŭtan surfacaĵon ; tial la masklo povas 2-foje pli rapide spiri : Kompreneble amoraj esprimadoj spiregigas !

Alia surprizo por la angla naturalisto William Edwards : Li lokis la ranojn en akvo-fluo kaj pere de reto malpermesis, ke ili revenu al la surfacaĵo (kaj al la aero).

Tamen la ranoj daŭre vivis en la akvo dum pluraj monatoj, verŝajne ne ĝenataj. Konklude : la rano-haŭto kapablas sorbi la oksigenon entenatan en akvo.

Sed, sed... tiu haŭto enlasas ankaŭ akvon : ĝi estas vera filtrilo tra kiu likvaĵo facile eniras kaj tiel facile eliras. Rano ne bezonas malfermi buŝon ; sufiĉas, ke ĝi metu sian ventron en akvon kaj tuj ĝi agas kiel spongo ; kiam ĝi eliras el akvo, tiu ĉi eliras kaj vaporiĝas ; la rano povas perdi 45 % de sia pezo kaj sekve ege malfortiĝas, sufiĉas, ke ĝi retrovu akvon por tuj re-ŝveliĝi kaj tuj re-fortiĝi. Same facile tiu haŭto-filtrilo sorbas la diversajn materialojn solvitajn en akvo ; tiamaniere oni povas sukerigi ranon aŭ ĝin grasigi, kiam akvo entenas sukeron, oleon aŭ lakton. Tiu haŭto, glata, nuda, preskaŭ sateno-haŭto, ŝuldas sian aspekton al la kalko-saloj entenataj en akvo. Tamen la rano kovriĝas je defenda venana muko ; ĝi ne estas virulenta, kiel tiu de bufo ; ĉe la verda raneto de niaj lagetoj ĝi okazigas brulo-sensacion ; inokulita al birdoj, ĝi okazigas paralizon, konvulsiojn kaj morton. En tropika Centr-Ameriko la tieaj Indianoj uzas tiun mukon por siaj sagoj ; ĝi estas virulenta tokso, mortiga por homo, simio kaj jaguaro.

Plej facile oni senhaŭtigas ranon ; longtempe oni demandis sin ĉu tiu haŭto estas nur sako sen ligo-punktoj kun la korpo ; estis eraro : tiuj ligo-punktoj ekzistas : ili formas vandojn, kiuj limigas malplenajn sakojn : la limfatismaj sakoj, kiuj povas pleniĝi je akvo ; ĉe la Malezia rano tiuj sakoj tiel multe ŝveliĝas, ke la rano ŝajnas dika prakuzino de tiu, kiu deziris fariĝi tiel dika kiel bovo, veziko, kiu senmove naĝas sur akvo.

Periode la rano formetas sian haŭton ; la superaj tavoloj de ĝia epidermo atrofiiĝas por iĝi netravidebla korneca ŝeleto el kiu la rano eliĝas same kiel motorciklisto el sia motorciklista vesto ; ĝenerale la rano ĝin manĝas ; sed povas okazi, ke estas ĝiaj kamaradoj, kiuj ĝin manĝegas dum la senvestiĝo. Tiu haŭto-ŝanĝiĝo permesas al rano renovigi siajn kolorojn : la eta verda raneto sinsekve aŭ samtempe montras ĉiujn nuancojn de ĉiel-arko ; tiuj ŝanĝiĝoj ŝuldiĝas al specialaj ĉeloj : la kromatoforoj (kolor-portantoj) ; estas la blanka pigmento, kiu donas la perlamotajn rebrilojn ; temperaturo, lumo, humideco, sekeco kaj emocioj impresas la kromatoforojn. Mimetismo en tiu popolo triumfas. Kvankam senigita je ĝiaj okuloj kaj eĉ je ĝiaj cerbaj hemisferoj la rano tamen turniĝas al lumo : tio pruvas ke ĝia haŭto entenas foto-sentivan aparaton, kiu rilatas kun muskola sistemo.

Spallazani montris, ke ranoj ne bezonas pulmojn por spiri. Do, je kio ili utilas ? ĉe kelkaj ranoj, precipe ĉe la maskloj, ili okupas la du-trionojn de la abdomena kavo kaj formas sur la dorso du simetriajn ŝvelojn ; pro manko de ripoj, movigitaj de muskoloj, kiel ĉe homa korpo, la ranoj ne havas pneŭmatikan maŝinon por spiri ; ilia buŝo rapide fermiĝas kaj malfermiĝas kaj havigas al pulmoj la aero-oksigenon necesan al hematozo ; pulmoj estas pli speciale hidrostika aparato, veraj buoj, kiuj igas ranon vera batiskafo.

Rankanto : La batraka gento (kaj la cikada) estas plej bruema ; en printempo rano-ĥoro estas surdiga : estas la masklo, kiu distrumpetas ; tiucele li ricevis superlaringon kaj komplikan sistemon entenantan specialajn muskolojn, kartilagojn, voĉkordojn, kiuj kontribuas al tute eksterordinara rezulto. Oni povus imagi, ke la masklo forĵetas siajn silabokantojn kiel koko siajn kokerikojn ! Tute ne ! Buŝo kaj naztruoj estas fermitaj : la rano estas ventro-parolanto ; tial, malfacile estas ĝin lokalizi ; plue ĝi povas kanti sub akvo ; « voĉaj sakoj » estas subepidermaj aŭ eksteraj ; tiuj ĉi povas enorme ŝveliĝi kaj rolas kiel resonatoroj. Kiam la eta raneto kvakas ĝi eligas el sub sia gorĝo strumon preskaŭ tiel dika kiel sia korpo. Tamen ekzotikaj ranoj multe pli bele efikas ; en Paragvajo unu el ili, kiam ĝi kantas, similas dikan bulon ; kiam ĝi silentiĝas, ĝi ŝrumpas ĝis 1/5 de sia volumeno ; ĝi ŝajnas krevita balono kaj litere malaperas antaŭ niaj okuloj ; kelkaj portas siajn « voĉajn sakojn » sur la kapo, aliaj sur la brusto simile al mamoj de Ĉasista Diana ; aliaj portas ilin sub la ventro. Plej diversaj estas la kantoj de ranoj ; en Eŭropo kvakado estas klasika muziko. Alie rano klukas, bojas, rikanas, gruntas, fajfas, plorpepas, flutas, beas, pepas, sonorilas aŭ tintadas ; la taŭro-rano muĝas, la forĝista-rano eligas amboso-bruojn, la paragvaja rano miaŭas kiel katido ; aŭstraliaj ĝardenistoj kelkfoje aŭdas sub sia ŝpato ĝemetojn de nove-naskito : estas tiea rano, kiu enprofundiĝis en teron, kiam venis sekeco.

Kiam rano ranon manĝas : Rano ne scias gustumi frandaĵon ; ĝi, kun larĝe malfermita buŝo, glutas predon per unu nura dika gluto : unua tempo : la predo estas antaŭ la rano ; dua tempo (kiuj tujas la unuan) la predo estas EN la rano. Tamen kiam la predo estas impona la rano bezonas siajn krurojn por helpi al si. Rano havas belan stomakon ! ĝi povas gluti predon tiel dikan kiel si mem ; tiu viscero estas tiel eltirebla, ke, tute ŝvelita, ĝia vando estas tiel diafana kiel tiu de kolbaso-ŝeleto. En laboratorio, oni vidis afrikan ranon gluti samampleksan samulon ; oni devigis la glutemulon restitui sian kunulon... kiu tuj saltetis sen videbla ĝeno !

Malgraŭ siaj globaj okuloj muntitaj sur globartikoj la rano havas malbonan vidkapablon ; ĝia flaro estas tute nebona ; konsekvence ĝi kaptas ĉion, kio movas, eĉ kiam tio estas ruĝa ĉifono kun kaŝita fiŝhoko.

Tiu glutemeco komenciĝas en junaĝo ; larvoj manĝas la aliajn ; la naturalistoj uzas tiun glutemecon por havigi

al si skeletojn de bestetoj ; ĉu vi volas muso-skeleton tre puran ? Vi senhaŭtigas la mortan muson, metas ĝin en akvon plenan je ranidoj (la rufaj estas tre virulentaj) ; post kelkaj minutoj vi havas perfektan skeleton !

Fervoraj stringoj : Kiam la masklo plej laŭte kantas estas nepra alvoko al femalo plenplena je ovoj « Venu ĉi tien ». Nur tiu cirkonstanco kunigas la parulojn, unufoje en la jaro. Multegaj estas la ovoj en la ventro de la femalo : la ranoj estas malfortaj kontraŭ malamikoj ; ili povas postvivi nur dank'al abundega naskiĝokvanto ; la nombro varias laŭ la specioj (la « lerta » rano : 1 200 ovoj ; la rufa : 4 000 ; la verda : 10 000 ; la « taŭro » : 20.000). La nupta ĉambro elektita por la teneraj petoloj povas esti lageto, fosaĵo aŭ simpla flako. Ne necesas prezentado kaj flirtado. Tuj kiam la ino aperas, la viro saltas sur ŝian dorson, ŝin energie brakumas kaj... ne ellasas ŝin; li havas hokojn, dornojn, malglataĵojn, kusenetojn, kiuj permesas firman tenadon. La malfeliĉulineto naĝas ĉiudirekten, promenante sian strangan rajdanton. Ne estas eble lin forigi el ŝia dorso ; oni provis lin elpreni, lin stumpigi, bruligi liajn krurojn, verŝi sur lin incitantan likvaĵon ; Spallanzani eĉ senkapigis la brakumanton... Li ne cedas ! Ne imagu, ke tiu viro plenumas ian ajn aktivadon. Tute ne ! li atendas. Li atendas ke la ovoj eliĝu ! tiam li fekundigos ilin. La atendo povas esti tre longa : kelkajn horojn, sed ankaŭ dum tagoj eĉ dum... semajnoj. Ĉar la maskloj estas pli multnombraj ol la inoj, oni vidas malfeliĉajn femalojn, kiuj transportas 7-8 stringulojn ; tio formas strangan grapolon ; pli ol unu knabino mortas sufokita ; tio ne ĝenas la maskloj n... kiuj longe atendos !

Iĝinta patro, la masklo plej rimarkinde plenumas sian patran devon ; kelkaj tamen forlasas siajn ovojn, kiuj falas sur la herbojn de la lageto ; aliaj konstruas nestojn el sekigita ŝaŭmo ; aliaj transportas la ranidojn sur sia dorso aŭ alkroĉitaj al sia ventro. La « Rinodermo » vivas en Argentino kaj Ĉilio. Kiam la ovoj estas fekunditaj la patro restas apud ili 10-20 tagojn ; tuj kiam la embrio moviĝas li glutas ĝin (ne por ĝin manĝi, sed por ĝin meti en sian voĉan sakon, kiu utilas kiel kovilo) Baldaŭ la sako entenas 15-20 embriojn ; ili metamorfiĝos en tiu sako, kiu liveras al ili la necesajn nutrantajn sukojn. Oni povas ilin vidi, ĉar la sako estas travidebla ; laŭmezure kiel la idoj grandiĝas, la sako disstreĉiĝas ; la patro havas enorman ventron ... kaj kompreneble ne povas kanti.

Finfine la etuloj efektivigis sian metamorfozon. La patro firme stariĝas sur siaj 4 kruroj ; lia abdomeno estas skuata de violentaj kuntiriĝoj ; tra sia buŝo larĝe malfermita li eligas, unu post la alia, la bebojn, kiuj eksaltetas sur siaj etaj kruroj.

La ranido simbolas la unuan batrakon (unuan vivantan estaĵon) kiu eliris el la akvoj antaŭ 250 milionoj da jaroj, por vivi kaj spiri en aero. Unue fiŝo li havis eksterajn brankojn, kiuj iĝis internaj kaj fariĝis pulmoj.

Rano, arba aŭ akva, ĉiam ege interesis la serĉantojn. En la XVII-a jarcento dank'al mikroskopo oni studis la angiojn de ĝiaj interfingraj membranoj kaj oni malkovris la sangajn globetojn. Efiko de elektra kurento sur la muskoloj de ĝiaj femuraĵoj permesis la laborojn de Galvani kaj kondukis al la pilo de Volta. Jean Rostand uzis ranojn por siaj laboroj pri heredeco kaj partenogenezo.



Grésillon 20 jaroj

Ne nur la Esperantista Kulturdomo agis per kaj por Esperanto dum la dudek lastaj jaroj, sed ĉiuj organizoj kiuj dediĉas siajn fortojn sur la vojo montritą de Zamenhof, ankaŭ alportis sian propran helpon al disvolviĝo aŭ utiligo de Esperanto.

Tial la E.K.D. organizis simpozion por diskuti la agadojn de ĉiuj esperanto-organizoj. Kelkaj el tiuj organizoj bonvolis sendi al Grésillon reprezentantojn kiuj havis la eblecon paroli pri la koncerna organizo kaj kiuj, tre afable, partoprenis en la redaktado de la ĉi-malsupra protokolo, kiu, tiel, estas la oficiala konkludo de tiu simpozio.

PROTOKOLO POR LA SIMPOZIO PRI « 20 JAROJ DA AGADO POR ESPERANTO »

Okaze de sia 20a jaro la Esperantista Kulturdomo organizis simpozion, kies celo estis kunigi kaj konigi la klopodojn de ĉiuj internaciaj Esperanto-organizoj.

Dum tiu simpozio sinsekve parolis reprezentantoj de la jenaj organizoj : Universala Esperanto Asocio, Sennacieca Asocio Tutmonda, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Mondpaca Esperantista Movado, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Krome, la ĉeestantoj aŭdis prelegojn pri la Esperantista Kulturdomo, pri la lingva problemo en Belgujo, pri la nunaj problemoj koncerne la atakojn de la homaro kontraŭ la naturo kaj pri la historio de la urbeto Baugé, kie staras la Esperantista Kulturdomo.

Tiu programo, kompletigita per ekskursoj al diversaj interesaj vidindaĵoj de la Anĵua regiono, donis sufiĉe ampleksan panoramon de la ĝenerala vivo en Esperantujo.

Kvankam diversaj organizoj bonvolis sendi reprezentantojn al tiu simpozio, la ĉeestantoj bedaŭris la foreston de kelkaj aliaj organizoj, kiel Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj Tutmonda Esperanta Ĵurnalista Asocio, kies rolo por Esperanto estas aparte grava, kaj kiuj, kiel la 30 plej gravaj internaciaj Esperanto-Asocioj, ricevis inviton al tiu simpozio.

La organizoj kiuj sendis reprezentantojn donas tamen bonan spegulon de la tuta Esperanto-movado, kaj la ĉeestantoj povis ekkoni plej diversspecajn asociojn kun malsamaj rimedoj kaj ŝajne malsamaj celoj :

« Universala Esperanto-Asocio, fondita en 1908, estas ĝenerala asocio neŭtrala « rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj » : ĝia celo estas informadi pri Esperanto, daŭrigi la tradicion de la Universalaj Kongresoj, kaj kunigi ĉiujn eblecojn de instruado kaj kulturaj aktivecoj por disvastigi la Lingvon Internacian. Tial U.E.A. opinias same gravaj varbi novajn esperantistojn por kreskigi la esperantlingvan komunumon, kaj montri al la oficialaj instancoj la utilecon, kaj eĉ la necesecon, de internacia lingvo. »

« Sennacieca Asocio Tutmonda, decide neneŭtrala, laborist-tendenca, sed ne partipolitika, kaj eĉ eksplicite kontraŭdogma, estas sennaciece organizita, kun nur individuaj membroj. La plej avangardaj flegas la doktrinon sennaciismo, kies ĝermoj estis jam en ideoj de Zamenhof kaj Hodler. La laboristaj asocioj varbas kaj instruas ; S.A.T. strebas enfaktigi nian aferon. La ideo « Internacia Lingvo » estas kerne revolucia ; ĝi nature kontraŭas naciismojn. Ni ne tro kredu je ŝtatoj-providencoj ; ni agu mem ! »

« Mondpaca Esperantista Movado sin prezentas kiel Esperanta ero de pli ĝenerala movado por mondpaco. Ĝi apelas ĉiujn esperantistojn, kia ajn estas ilia nacieco, raso, aŭ filozofio, batali konkrete, kune kun neesperantistaj porpacaj organizaĵoj, kontraŭ la imperiistaj intrigoj, por likvido de nuntempaj konfliktoj, por paca kunvivado kaj por ĝenerala malarmado. »

« Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista interesiĝas pri spiritaj temoj kunigante la katolikajn esperantistojn kaj akcentante la komunan celon de la katolikoj kaj de la esperantistoj al reciproka amo de ĉiuj homoj. Ĝia agado estas duobla, por Esperanto en la katolikaj medioj, por la katolika kredo inter la esperantistoj. »

« Internacia Fervojista Esperanto-Federacio laboras sur ĉefe faka tereno kaj tiel povas utili al la diversaj esperantistoj dum iliaj vojaĝoj kaj montras la utilecon de Esperanto en faka laboro kiu estas nepre internacia laŭnature. Elstara celo estas traduko de seslingva oficiala terminaro de la eŭropaj fervojoj en Esperanton por tiel kontribui al unueca fervojista faklingvo sur monda nivelo. »

Per tiu nura kaj rapida skizo de la ĝenralaj ecoj de tiuj organizoj, oni tuj vidas, ke komuna celo ekzistas. Ĝi konsistas el ĝenerala klerigado, per universala vido de nia mondo, kaj el lukto kontraŭ la disigantaj fortoj kaj helpo al la kunigantaj fortoj de tiu mondo. Sed tiu simpozio montras ankaŭ la grandan diversecon de la rimedoj proponitaj, diverseco kiu tute simple spegulas la naturan diversecon de la homaro, kies anoj havas ĉiujn diversajn pensmanierojn.

Tiu simpozio okazis en tute tolerema etoso, ĉiu havis la eblecon senkaŝe doni sian vidpunkton, kaj la viglaj diskutoj, kiuj sekvis ĉiujn prelegojn klare montris la intereson kaj la komprenemon de la ĉeestantoj pri ĉiuj problemoj kaj rimedoj proponitaj de la diversaj organizoj, kies diverseco aspektis ne nur natura sed ankaŭ necesa. Sed ankaŭ montriĝis necesaj tiaj simpozioj, kie aperas la komuna celo kaj la neceso de interkomunikado.

Fine aperis, ke tiajn utilajn simpoziojn devus pli ofte organizi la Esperantista Kulturdomo, kies loko montriĝas tiucele oportuna forumo.

1972 LIBRO-JARO

MENDU LIBROJN AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

S-ro CIRET, route de la Boulerie, Viel-Baugé

F - 49150 BAUGE

Vi tiel havos plezuron legante esperantajn librojn
kaj helpos la Esperantistan Kulturdomon

Ŝakludo dumiljara

Origino de ŝakoj perdiĝas en la nokto de la estintaj tempoj. En la egiptaj tomboj, datumitaj de la antaŭdinastia periodo, oni trovis diversajn pecojn kaj tabulojn sur kiuj linioj ortangule kruciĝas. Tio estas strategia ludo, je kiu plezuriĝis, antaŭ 4 000 jaroj, la loĝantoj de la Nilbordoj. Certe ĝi estas la praulo de ŝakludo kaj damludo. Laŭlonge de la jarcentoj la egipta ludo migris orienten ; ĝi logis hindojn kaj ĉarmis ĉinojn, kiuj ĝin perfektigis kaj .... komplikis.

Multaj legendoj bildigas la originon de ŝakoj.

Palamede estis reĝo de Eŭbeo, insulo de la greka Arkipelago. Dum la sieĝo de Trojo li deziris distri Ulison kaj la aliajn grekajn ĉefojn, sed tamen ne malvigligante ilian strategio-senton. Je tiu celo li estus inventinta la ŝakludon, ludo subtila kaj logika, vera transpozicio de la milito sur abstrakan terenon.

Sissa estis, laŭ onidiro, ŝarĝita je edukado de Sharam, juna hinda suvereno. Sissa imagis metodon tute similan je la niaj, nuntempaj : « Studo per Ludo ». Li estus kreinta ŝakludon. Sharam, ĉarmita de la metodo, promesis al Sissa rekompencon tian, kian li ĝin deziros, kaj (tion, ĉiu el ni scias) petis tritiko-grajnojn, tiamaniere kalkulitajn : « Unu grajno sur la unua ĉelo, 2 sur la dua, 4 sur la tria, K.T.P. ĝis la 64-a ĉelo. Certa pri bona afero, Sharam ĝojis, sed ne longatempe ! Sufiĉas kalkuli : 2^{64}-1 fakte donas 18 446 744 073 5551 615 (kio estas multe pli ol 18 kvinilionoj !).

Tiu rakonto troviĝas en la ŝak-vortaro de Le Lionnais, kiu precizigas : « tiu grajnoj-kvanto kovrus Francujon laŭ tavolo dika je unu metro ».

S-ro Murray, brito, asertas en sia kolosa « Historio pri ŝakoj », publikigita en 1913 : « Nediskuteble tiu kalkulo estas el hinda origino ; la praaj hindaj matematikistoj pasiiĝis por tiaj problemoj ; tiu legendo ankaŭ ĉeestas en la arabaj manuskriptoj de la X-a jarcento kaj, sub alia formo, en ĉinaj skribaĵoj ». Tamen S-ro Murray esprimas sian skeptikecon pri Palamede kaj Sissa. Li opinias, ke « Chatarunga kun 4 reĝoj », kiu aperis en Hindujo en la dua duono de la VI-a jarcento, konstituas la primitivan formon de ŝakludo.

« Chatarunga » postulis 4 ludantojn : ili ĵetis etkubojn por determini la translokendan pecon. La Irananoj adoptis la « 4 reĝojn » — n kaj nomis ĝin « Shatrang ». Poste estis la Araboj, kiuj, siavice, pasiiĝis pri tiu ludo. Laŭlonge de la 100 sekvantaj jaroj, oni forlasis la etkubojn, kiuj tro pezigis la hazardon, kaj restis nur DU ludantoj.

Estas Haroun Al Rachid, kalifo de Bagdad, kiu donacis grandvaloran ŝaktabulon al Charlemagne (Karlo la Granda), en la tiesa kortego ŝakoj furoris.

Ĝesto-kantoj kaj malĝentilaj gestoj

Laŭ la ĝestokantoj de la XII-a jarcento, ŝakludantoj pasiiĝis kaj ofte ŝaktabulo kaj ŝakpecoj servis al tute ne pacaj celoj. En « Ogier de Danlando » oni rakontas vivplenan ŝak-renkonton inter Baudouinet, digna ido de Ogier, kaj Karloĉjo, la unuenaskito de la Imperiestro kun « florita barbo ». Ogier venkas kaj mokas — antaŭ lia tuta kortego — sian kontraŭulon. Ofendita Karloĉjo perdas sian memregon kaj sin fordonas al bedaŭrindaj agoj : « Bastardo ! li krias, kaj li prenas la ŝaktabulon kaj la infanon frapas, kio ekflugigas la ostojn el la kapo kaj elŝprucigas la cerbon ! »

Samcirkonstance iu Thivet senkapigas sian nevon, venkanton de decida partio.

En la « 4 filoj de Aymon » Yvonnet primeditas sian movon dum Richard, duko de Normandio, ponardas pere de ora Damo kelkajn trudiĝemulojn, kiuj intencas lin konduki al prendumado antaŭ la fino de la partio.

Gauvin, galanta « zoro » de la ŝakoj

En Mezepoko ,edukado entenis instruon de ŝakludo al la junaj nobelaj Sinjoroj. Eĉ, estis konsentite, ke la plej lertaj (je ŝakoj) kavaliroj donu lecionojn al nobelaj Damoj, eĉ en ilia ĉambro. « Hontu kiu malice pensas ».

Sed, ja, troviĝis grumbluloj !

En « Percival » (1175) Chretiens de Troyes klarigas kiamaniere Gauvin estis surprizita de sbiroj, senditaj de malkontentulo, ĝuste en la momento, kiam li lernigis al sciema junulino la « maton de la ŝafisto » ; komprenebla la galanta ŝakulo estis lasinta sian bravan spadon en la antaŭĉambro. Kion fari ? Gauvin, mezepoka « zoro », uzante ŝaktabulon kiel ŝildon, postkuras siajn mirigitajn malamikojn ; dume la ŝak-amantino bombardas ilin per la pezaj ŝako-pecoj

Tiu furoro pri ŝakoj malbridigis la pasiojn : deliraj estis la vetaĵoj : mono, bienoj, virinoj !

Eklezio kaj reĝoj intervenas kaj ŝakoj estas malpermesataj dum kelkaj jaroj.

La jaroj pasas .. kelkaj pecoj ricevas alian movon kaj eĉ alian nomon.

Ĉampionoj : estas en la XV-a kaj XVII-a jarcentoj, ke ŝakoj atingas sian modernan formon kaj famigas kelkajn nomojn : Lucena, Damiano, Ruy Lopez, la unua monda ĉampiono.

En Hispanujo (1575) la reĝo, Filipo la dua, organizis grandan ŝak-turniron : la italo Leonardo gajnas kontraŭ Lopez, kiu, dum 20 jaroj ne trovis rivalon.

Dum unu jarcento Francujo kun Philidor, Deschapelles kaj La Bourdonnais estas sur la unua rango ; dume la Filozofoj : Voltaire, Rousseau, pasiiĝas por ŝakoj.

De 1843 al 1921 estas la angloj kaj la germanoj : Stauton, Andersen, Morphy, Stenitz, Lasker, Alhekine, kiuj triumfas.

De 1927 unuarangiĝas la Slavoj ; tamen en 1927 jen rapida brilo de kubano Capablanca, kiun Alekhine venkas en 1927 ; kaj efemera triumfo de nederlanda Euwe en 1936.

De 1948 la ĉampiono-Titolo estas en Rusujo kun Botwinnik, Smyslov, Tal, Petrossian kaj Alekhine.

Certe Rusujo estas la patrujo de la ŝakludantoj.

Ŝakludantaj maŝinoj

Nune Sovetanoj kaj Usonanoj konstruas elektronikajn maŝinojn, kiuj kapablas ŝak-ludi. La demando estas : « Kial dediĉi tiom da inteligenteco, tiom da mono kaj tempo al konstruo de mekanikaj ŝakludantoj ? » S-ro Le Lionnais respondas : « Pripensado necesa al ŝakoj enskribiĝas en diversaj pensformoj, komunaj al multaj aktivaĵoj, kiuj postulas serĉojn kaj decidojn. Plue ŝakoj permesas pliprofundigi kaj klarigi la procezojn de la homa rezonado ». Certe Homo povas konstrui maŝinojn, kiuj ŝakludos tiel bone, kiel majstroj. Sed la problemo estas la enormaj elspezoj necesaj al ellaborado de tiel perfektaj kaj komplikaj maŝinoj : tiuj maŝinoj al kiuj oni encerbigas ŝaknociojn ne kapablas elimini kelkajn el la variantoj... kiuj atingas astronomian kvanton.

Tamen tre altnivelaj estas tiuj maŝinoj ; tion montris la turniro, kiu okazis, en 1967, inter I.B.M.-709 de Standford - Universitato en Kalifornio kaj Komputero M 20 de Instituto pri Fiziko en Moskvo. En determinita pozicio malforta ŝakludanto antaŭvidas 20 eblaĵojn. Sed majstro scias, ke al li sufiĉos 2-3 movoj ; lia cerbo fulmrapide eliminas la senutilajn movojn : estas reflekso kondiĉita de la loko de la ŝakpecoj sur la ŝaktabulo. Laŭ ekspertoj tiu elimino-procezo ne povas esti encerbigita al la nunaj maŝinoj. Tamen elektronikaj maŝinoj plej rapide solvas problemojn kun limigitaj donitaĵoj : la Siemmens-2002 en Instituto de Tibingen bezonas 10 minutojn por efektivigi « maton en 2 movoj ».

Maŝino de Kempelen. Jam en la 18-a jarcento Kempelen imagis maŝinon ; en la komenco ĝi povis solvi unikan problemon ; baldaŭ la admirantoj laciĝis... kaj Kempelen imagis specialan sistemon ; dum duona jarcento la aŭtomato mirigis reĝojn, imperiestrojn kaj korteganojn inter kiuj Frederic la Granda kaj Napoleon. La sukceso de tiu aŭtomato naskigis ĵaluzon ĉe iluziisto ; iun tagon, antaŭ la maŝino, li ekkrias « Brulo ! brulo ! » kio okazigis grandan emocion en la maŝino subite skuata de la ektremoj de la ludanto interne kaŝita !

Blinde ludi

La nuntempaj majstraj ŝakludantoj kapablas venki la usonan I.B.M. kaj ĝian sovetan rivalon .... ludante sen vidi la ŝaktabulon ! Jam de 1 000 jaroj oni praktikas tiun blindan ludon. Plej miriga konstato, kiu malfermas antaŭ ni la homan cerbon kaj ĝiajn neimageblajn eblojn.

Bona ludanto povas — vidante la ŝakojn — facile fronti sammomentajn kontraŭulojn. Samfacile li povas konduki « blinde » unu nuran partion. Sed kio estas eksterordinara estas fronti ambaŭ formojn : « blinde » ludi kontraŭ diversajn ludantojn !

Jen kelkaj « blindaj » sukcesoj :

1857 : Philidor gajnas 3 partiojn ; Paulsen (1875) : 10 p. ; Blackburne (1875) : 15 p. ; Pilsburg (1902) : 22 partiojn ; Alekhine (1932) : 32 p. ; Najdorf (1942) : 40 p. ; Flesk (1960) : 52 p. ; Koltanovski (1953) : 50 p.

LA INTERROMPITA ŜAKPARTIO

— Iru al via onklo !

Peĉjo, juna petolema knabo, kiu baldaŭ estos 11 jara, ne tiom ŝatis — tio estas bone konita — pasigi siajn ĵaŭdojn posttagmeze ĉe la onklo Karlo, kiu loĝis ĉe la alia ekstremaĵo de la strato, en tiu malgranda urbeto.

Sed, aliflanke, la patrino ne ŝatis havi lin ĉirkaŭ si dum kiam ŝi reordigis la aferojn en la domo, kaj tio, precize la ĵaŭdajn posttagmezojn !

Tamen, tiun tagon, Peĉjo ne multe kontraŭstaris.

— Mi iras, panjo.

Li prenis sian kajerujon, kun kelkaj libroj, kaj kelkaj nedifinitaj bagatelaĵoj en ĝi. Li kisis sian patrinon, kiu rekomendis ke li nepre paŝu sur la trotuaro, pro la veturiloj, kaj ke li revenu antaŭ la 6 a.

Ĉe onklo Karlo estis malgranda ĝardeno, kun ŝirmejeto. Peĉjo povis sidi en ĝi por legi siajn preferitajn librojn. Tie, li estis tute trankvila, ĉar onklo Karlo, kiu alproksimiĝis al la 50 a, kaj estis konvinkita fraŭlo, ricevis sian longdaŭran amikon : Antono LAGRASON, emerita fervojisto, kaj ambaŭ pasigis la posttagmezon ludante ŝakludon.

Tiun tagon, Peĉjo estis iom frua, kaj la onklo ricevis lin per la demando :

— Nu, jam vi venas ?

— Jes, onklo. Ĉu Sinjoro LAGRASO ne estas tie ?

— Nature ne, vi bone scias ke li alvenas nur je duono post la dua.

— Ah, jes. Diru, onklo, ĉu mi, hodiaŭ, povos resti en la salono por legi ?

— En la salono ? Se vi volas. Sed tiam, ne faru bruon, ĉar kiam oni serioze ludas, oni ne devas esti ĝenata. Metu vin tien, en la grandan fotelon.

— Bone, onklo.

Tiam, la onklo reiris al la kuirejo, por fini la purigon de la teleraro kaj meti iom da ordo post sia meztaga manĝado.

La duono sonoris ĉe la horloĝo, sur la kameno de la salono. Preskaŭ je la sama momento, mallonga sonorila tintado anoncis Sinjoron LAGRASO — fervoja akurateco —!

Kelkaj paŝoj en la koridoro. Bruo de pordo. Salutadoj. Kelkaj paroloj. Kaj, baldaŭ, S-ro LAGRASO aperis en la salono.

Peĉjo ekstaris, kaj iris al li por lin saluti.

— Kiel vi fartas, Peĉjo ? Ŝajnas ke vi restas kun ni, hodiaŭ ?

— Jes, Sinjoro LAGRASO.

— Bone ! Do, vi ne estos petolema, ĉu ne ?

— Ne, Sinjoro, mi sidas tie, en la fotelo.

— Bonege ! Nu, kara Karlo, ĉu tiun posttagmezon vi revenĝos ? Mi opinias ke la ŝakoj ne multe favoras vin de kelka tempo ?

— Nu, nu, ni vidos ! Ne kredu vin pli forta ol vi estas, kara Antono.

La ŝaktabulo jam estis sur la tablo, mem kovrita de larĝa tapiŝo. Ili sidis vid'al vide, kiel ĉiun ĵaŭdon.

— Al vi la komenco, diris S-ro LAGRASO. Vi malgajnis lastan fojon !

— Onklo Karlo abrupte antaŭenigis ĉevalan peonon, per 2 ĉeloj.

— Oh, oh, vi rapide ekiras, ekmiris Antono. Li iomete pripensis, kaj antaŭenigis sian kontraŭan peonon, ĝis tiu de la atakanto.

— Bone, diris onklo Karlo, kaj li metis la ĉevalon malantaŭ sia peono.

— Ah, tiel estas ! Mi tuj...

Je tiu momento, la ŝaktabulo iomete leviĝis, kaj seke refalis.

— Kio estas ? Vi tuŝis la tabulon ?

— Ne. Mi bone vidis la movon, sed mi kredas ke estas vi kiu puŝis ĝin.

— Certe ne ! Nu, ne malserenigu min. Mi antaŭenigos la...

Nova ektremo skuetis la pecojn, kiuj iomete ŝanceliĝis.

— Estas draste, diris S-ro LAGRASO. Ĉu vi finos min inciti por malhelpi mian ludadon ?

Onklo Karlo grumblis, kaj forte protestis :

— Sed, mi ne incitas vin ! Vi bone vidas ke mi ne havas la manojn sur la tablo ! Kial do vi akuzas min ?

LAGRASO rigardis sian amikon en la okuloj, kaj malrapide diris :

— Ĉar ne estas mi, povas esti nur vi kiu movas la ŝaktabulon !

— Tok, tok, faris la ŝaktabulo.

— Jen ! Vidu ! diris LAGRASO. Eliru for de la tabulo !

Onklo Karlo ekstaris, kaj solene faris paŝon malantaŭen.

— Mi atestigas la ĉielon, li diris, ke se la tabulo moviĝos, estas via kulpo !

— Tok !

— Nu ! Kio ! flustris LAGRASO. Kaj iom pala, li ankaŭ stariĝis, kaj malantaŭen paŝis.

— Tok !

Estis momenta silento. Kaj onklo Karlo diris mezvoĉe :

— Diru, Antono, ĉu vi antaŭe turnigis tablojn ?

— Ne, respondis Antono, Ne mi. Sed antaŭlonge, mi ĉeestis kunvenon ĉe najbarino. Ĉu vi kredas ke Spirito estas tie ?

— Tok, tok, tok !

— Ŝajnas, diris Karlo, ke oni ĵus respondis !

Ili ambaŭ rigardadis la ŝaktabulon kun sento de miro, kaj iom da timo. Ĝi ne plu moviĝis.

— Oni povas ĝin demandi, sugestis Antono. Post momento, li hazarde diris :

— Spirito, ĉu vi estas tie ?

Dum kvin minutoj, ili fiksis la tabulon. Sed nenio venis.

— Mi kredis ke oni bezonas mallumon ? diris Karlo.

— Jes, vi pravas, respondis Antono. Ni fermu la kurtenegojn. Oni tamen sufiĉe vidos.

Oni fermis la opakajn kurtenegojn, kaj nur fajna lumo restis en la salono. La du amikoj residiĝis, sed tamen iom for de la tablo.

— Kion oni demandos, diris onklo Karlo.

— Oni eble povas demandi kiu estas tie, diris Antono. Nu, kiu estas vi, Spirito. Apenaŭ la demando estis dirita, ke la ŝaktabulo saltadis : Tok, tok, tok...

— Kompreneble, rimarkis Karlo ! Kiamaniere vi volas ke li respondu ?

— Tok !

— Bone, diris Antono, ni literumu la alfabeton ; kaj li komencis : A, ...

— Tok !

— La unua litero estas : A, diris Karlo.

— Ni konu la dunan aldonis Antono. Li rekomencis : A, B, C, ... N, ...Tok !

— AN, elparolis li. Ni daŭrigu : A, B, C, ... N, Tok !

— Jen Spirito kiu ŝatas la N, rikanis Karlo.

— Oni vidos, interrompis Antono. Kaj renove : A, B, ... I... Tok !

— ANNI ? estas promeso, ni daŭrigu : A, B, C, ... E, ...Tok !

— Annie ? ekkriis Karlo, Estas Annie ? Do vi estas virino ?

— Tok !

— Bone. Ĉu vi konas min ?

— Tok !

— Ej, diris Antono, vi konis tiun virinon ? Kaj vi neniam parolis al mi pri ŝi ?

— Annie ; mi havis kuzinon kiu nomiĝis Annie. Ŝi mortis antaŭ 5 jaroj. Ĉu...

— Tok, tok, tok, tok, ... aprobis la ŝaktabulon.

— Nekredeble ! Do, estas vi Annie ?

— Tok !

— Tiam, Antono reprenis la parolon : Mi havas ideon. Kaj li ceremonie diris :

— Sinjorino, ĉu via kuzo estis bona ŝakludanto ?

— Tok, tok,

— Ĉu tio signifas : ne ?

— Tok !

— Do, via kuzo estis malbona ŝakludanto ?

— Tok !

— Karlo kontraŭstaris : Vi estus povinta demandi alion ! Plie, kion ŝi sĉias pri tia demando ? Nun por mi, Annie ! Ĉu mia amiko Antono estas malbona ŝakludanto ?

— Tok.

— Prenu tion ! diris Karlo.

— Malbona ŝakludanto, mi ? Sed vi ne plu memoras la frotaĵojn kiujn mi trudas al vi de pli ol tri monatoj !

— Ĉar mi bonvolis, kontraŭmetis Karlo. Kaj plie, kiu lernigis al vi la ŝakludon ?

— Vi eble lernigis la ŝakludon al mi, sed mi rapide fariĝis pli lerta ol vi. Kaj via orgojlo malpermesas al vi tion akcepti !

— Mia orgojlo ? Reprenu kion vi diris, Antono ! Mi ne povas tion toleri ! Onklo Karlo ekstaris. Alie, mi...

— Je tiu momento, Antono siavice lasis sian seĝon, kaj komencis ĉirkaŭi la tablon por alproksimiĝi. Sed, subite, la ŝaktabulo tremegis. Je la sama momento, nekonata forto prenis la piedojn de Antono.

— Al mi ! Reiru Satano ! Kaj, ekkaptinte la tablon, li abrupte falis teren, tirante kun li la tapiŝon kaj la ŝaktabulon, kies duono de la peonoj resaltis de sur lia kranio.

— Onklo, ekkriis Peĉjo kiu salte leviĝis, ĉu vi estas vundita ?

— Terure, mallaŭte diris la onklo, per blanktona voĉo. Ni ĵus estis atakitaj de malbona spirito ! Estas malfeliĉa Antonio kiu estis ĵetita teren !

Peĉjo sin turnis al S-ro LAGRASO, kaj aplikeme helpis lin eliĝi el la tapiŝo.

— Malfermu la kurtenojn, diris Karlo.

— Jes, onklo.

Kiam la kurtenoj estis tiritaj, oni pli bone vidis. S-ro LAGRASO ĵus estis ekstarinta, kaj frotis sian frunton. Peĉjo komencis kolekti la ŝakpecojn, kaj fine la ŝaktabulon. Li portis ĉion sur la kamenon.

— Almenaŭ, vi ne timis, Peĉjo, diris la onklo ?

— Mi ? Oh ! ne. Ĝis la momento kiam vi estis atakitaj, mi trovis ĉion tre amuza.

— Sed mi povus esti mortigita, plendis Sinjoro LAGRASO. Vere estas ke oni ne devas ludi kun la Spiritoj. Oni neniam scias kun kiu oni traktos ! Ĉiuokaze, por mi estas finite !

— Por mi ankaŭ, diris Karlo ! Kaj plie, evidente estas ke nin incitis malbona Spirito !

Kaj ne rakontu tion al via patrino, li aldonis, sin turnante eĥ Peĉjo. Tic timigus ŝin !

— Mi diros nenion, asertis Peĉjo.

Nun, onklo, se vi permesas, mi deziras tuj eliri, ĉar mi ne devas malfrue rehejmiĝi.

Nokte, en sia malgranda lito, Peĉjo malfacile malhelpis la nereteneblan ridadon kiu skuis lin kiam li denove pensis pri la fama posttagmeza kunveno, tiel tragike interrompita kiam S-ro LAGRASO, ekturnante ĉirkaŭ la tablo, inter ĝi kaj la muro, estis malfeliĉe preninta siajn piedojn en la kautĉuka tubeto kiu ligis, sub la tapiŝo de la tablo, la pilketon sub la ŝaktabulo, al la pilko kiun li presis en la fotelo, por respondi al la demandoj de la 2 amikoj.

Feliĉe, li ĉion reprenis justatempe, dum kiam li zorge senigis S-ro LAGRASON el la tapiŝo.

Sed, por tiu-ĉi fojo, li tute ne enuis dum sia ĉeesto ĉe la onklo !

E. JOUIS.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO
Rezulto de la konkurso 1971-1972

1 - S-ino Humm, 103 poentoj.
2 - F-ino Lemagadur, 102 poentoj.
3 - F-ino Kohler, 93 poentoj.
4 - S-ro Ligot, 92 poentoj.
5 - F-ino Vierne, 89 poentoj.
6 - S-ro Lanz, 87 poentoj.
7 - S-ro Menut, 82 poentoj.
k.t.p....

Ni tre kore kratulas la gajnintojn.

Konkurso 1972-1973

En ĉi-tiu numero komenciĝas nia konkurso 1972-1973. Ni denove memorigas la ĉefajn punktojn de ties regularo :

1) En ĉiu numero de « Kulturaj Kajeroj » aperonta de Oktobro 1972 al Aprilo 1973, vi trovos du problemojn, jen enigmon, jen krucvorton, jen tekston korektotan aŭ kompletigotan. La respondojn la gekonkursantoj sendu al

S-ro P. CHEVALIER
19, bd Gabriel-Lauriol
F - 44000 NANTES

autaŭ la fino de la monato sekvanta tiun de la apero de la revuo (ekzemple antaŭ la fino de Decembro por tiu-ĉi numero).

2) Kun la respondo (almenaŭ la unuan fojon) bonvolu sendi la banderolon de la gazeto, kiel atestilo de abono.

3) La du gajnintoj de la du antaŭaj konkursoj ne rajtas partopreni la ĉijaran konkurson.

4) La premioj konsistas el
a) 15-taga restado en Grésillon,
b) 8-taga restado en Grésillon.

———

UNUA PROBLEMO (20 poentoj)

En la ĉi-subaj frazoj, bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj. Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste trovita, sed estos forprenita po 1 poento por ĉiu vorto malĝuste trovita.

1) ... la mateno ... la deka horo ... la horloĝo de la piloto, ĉio estis preta.
2) La kuracisto metis ... manojn sur liajn ŝultrojn.
3) Li signis ... ... mano.
4) Tio okazis en la tempo, ... la feinoj ... ankoraŭ pasadis ... la tero kaj miksis ... en la homajn aferojn.

DUA PROBLEMO (20 poentoj)

La Esperanta hejmeco

P A T R O
P A T R I N O
F I L O
F I L I N O
———————
F A M I L I O

En tiu interesa kaj tute ĝusta adicio, kiel vi vidas, estas dek diversaj literoj. Tamen la literoj formas ne nur vortojn, sed ankaŭ nombrojn, ĉar la dek literoj signifas la dek ciferojn, kiuj estas uzataj en la aritmetiko.

Kiu povas transskribi la literojn en ciferojn, tiel ke la rezulto estu ĝusta adicio de nombroj? La sama litero ĉiam signifas la saman ciferon.

Bonvolu klarigi vian solvon.

———

AMUZAJ PROBLEMOJ
(apartaj de la konkurso)

Pro manko de spaco ni ne povas aperigi ĉi-tie la solvon de la Krucvortoj de la antaŭ numero. Gi aperos en la proksima numero. La legantoj bonvolu senkulpigi nin.

NOVA PROBLEMO

En la lasta numero de « Kulturaj Kajeroj » ni proponis Enigmon kiu ne estis solvebla ĉar mankis linion pro preseraro. Ni petas pardonon de niaj legantoj kaj proponas denove la saman problemon, nun kompletan, almenaŭ ni esperas.

ENIGMO

1. La naskiĝjaron de Zamenhof multobligu per la naskiĝmonato.
2. Al la ricevita sumo aldonu la mortojaron.
3. La sumon dividu per la naskiĝtago.
4. La rezultaton multipliku per la mortotago.
5. Aldonu la jaron de la apero de Esperanto.
6. La sumon obligu per la mortomonato.
7. Deprenu la jaron de la unua universala kongreso de Esperanto.
8. La ricevitan nombron obligu per la nombro de liaj infanoj.
9. Deprenu la numeron de la kongreso de Esperanto de 1959.
10. Dividu per la nombro de la pintoj de la verda stelo.
11. Deprenu la nombron de la filoj de D-ro Zamenhof.
12. Dividu per la nombro de liaj filinoj.
13. Deprenu la nombron de liaj geavoj.
14. Dividu per la nombro de la gramatikaj reguloj en la « Fundamento re Esperanto ».
15. Aldonu la nombron de la kontinentoj, en kiuj Esperanto estas parolata.
16. Dividu per la nombro de la koloroj en la esperantista flago.
17. Aldonu la nombron de la plenaj vivjaroj de D-ro Zamenhof.
18. Fine aldonu la nombron de la literoj en la unuaj du linioj de la poemo de Zamenhof « Al la fratoj ». — *Kiel finrezultaton vi ricevos faman nombron, kiu estas konata el la mondliteraturo.*

DE LA REDAKCIO

Ni kore dankas al S-ro Salasc, kiu afable sendis interesajn amuzajn problemojn. Lian ekzemplon sekvu vi.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

PREPOZICIO

Prepozicio esprimas rilaton inter vortoj ; plej ofte ĝi montras :

— **nerektan aŭ cirkonstancan komplementon de verbo :**
  - mi vivas kun li en granda amikeco (z)
  - super la tero sin trovas aero (z)

— **komplementon de substantivo, adjektivo aŭ adverbo :**
  - monumento el la antikva tempo (P.V.)
  - glaso plena je vino (z)
  - en la ĉambro sidis nur kelke da homoj (z)

RIMARKOJ

La prepozicioj, plejparte kreitaj de Zamenhof, montriĝas sub diversaj formoj ;

— **kelkaj finiĝas per konsonantoj,** kio ne estas kutima en esperanto : apud sub, sur, kun ;

— **aliaj ricevas aŭ-finaĵon :** antaŭ, anstataŭ, ĉirkaŭ, kontraŭ, laŭ, malgraŭ ; (tiu aŭ-finaĵo retroviĝas en kelkaj adverboj : ankaŭ, hieraŭ, almenaŭ...).



Edza komplekso


— Kio okazas pri Paĉjo ? li ŝajnas tute nekontenta ; ĉu la moskitoj tedis lin dum la nokto ?

— Jes, estas pro la moskitoj ; plue, hieraŭ vespere, li forgesis sian pipon ĉe la marbordo. Sed kio plej mankas al li estas klakigi la pordojn !



Kaprico de la Naturo

Mil tondroj ! En frumateno mi venis ĉi tien por akvumi la legomojn de tiu ĝardeno ; mi transportis pli ol 30 sitelojn da akvo kaj nun pluvegas !



Iom da komprenemo

Kara fraŭlino Gabriela, mi bone komprenas, ke vi estas plena je pudoro, sed malpli da malfido je mi donos por nia floso la nepre necesan velon, kiun vi posedas.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE.

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6. (27 lei).

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE.

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 5 de 1972, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Un nouvel été est passé, le vingtième. Nous avons fêté ce 20e anniversaire avec les amis présents, avec les municipalités de Baugé, Pontigné et St-Martin-d'Arcé. Certains diront que ce 20e anniversaire a été trop discret. Peut-être. Mais nous avons préféré le célébrer ainsi et nous avons été heureux, touchés, que des amis des premières heures aient tenu à participer à cette fête « familiale ». Nous aurions pu évidemment faire sonner les trompettes de la renommée. Mais nous préférons que cette renommée se répande de bouche à oreille. C'est le gage le plus sûr d'une réputation solide qui demeure quand les trompettes se sont tues. Pour nous, 1972 marquait une date sur le calendrier mais pas une étape dans l'action de l'équipe qui dirige la Maison. Cette action est continue, lente par la force des choses ; elle se constate sur place plus que dans des rapports.

La saison d'été s'est encore une fois déroulée avec succès. Les deux périodes traditionnelles de cours, en juillet et en août, ont réuni un nombre équilibré de personnes et la participation aux activités diverses montre que la formule adoptée continue à être appréciée, ce qui ne veut pas dire qu'elle soit intangible. La quinzaine internationale à laquelle J.-P. Guillot avait cette année donné un programme particulier, sans atteindre le succès que nous espérions du fait de l'absence de quelques organisations internationales pressenties, a cependant recueilli les suffrages des participants. Elle a d'autre part permis une confrontation utile sinon pour les organisations représentées du moins pour les espérantistes présents. Décidée un peu tard, la semaine de la Commission Espéranto de l'Institut Coopératif de l'Ecole Moderne a éveillé l'intérêt des éducateurs Freinet. M. Le Magadure a obtenu un succès qui, bien que limité en nombre par suite des circonstances, est assez encourageant pour lui permettre d'organiser un stage semblable, de deux semaines, l'été prochain.

Le bilan financier, impossible à faire de manière certaine dès maintenant, semble satisfaisant. Que nous permettra-t-il de réaliser ? Le Conseil d'Administration en décidera le 22 octobre. Peut-être pourrons nous envisager, avec l'aide de l'Association Culturelle, de commencer à réaliser le projet de salle de conférence. Merci à tous ceux qui nous apportent leur aide.

P. BABIN.

LA REVUE

L'année 1972 se termine. Etes-vous certain d'avoir réglé votre abonnement ? Vous nous rendrez service en le faisant rapidement. Faites connaître notre revue à vos amis. Nous avons de nouveaux abonnés. Mais il en faut encore d'autres si nous voulons que Kulturaj Kajeroj soit la revue que nous désirons vous offrir. Merci à tous.

Abonnés bienfaiteurs (suite)

Mme Martin (79)	15,00
M. Jannez (30)	15,00
M. Pannier 27)	50,00
S-ino Schmalz (Allemagne Fédérale)	15,00
M. Rousseau (75)	30,00
M. Offroy (57)	15,00
M. Brémond (49)	15,00
M. Pigneret (69)	20,00
M. Prévot (44)	30,00
Mme Pral (69)	15,00
M. Duval (95)	15,00
Mme Tharreau (72)	15,00
S-ino Eggers (Allemagne Fédérale)	15,00
S-ro Schutt (Allemagne Fédérale)	15,00
Mlle Stutzmann (68)	15,00
Mme Bidet (03)	15,00
M. Labit (92)	15,00
Mlle Levy (83)	15,00
M. Joubert (49)	15,00
M. Tragin (27)	15,00
Mme Desnos (53)	15,00
S-ro Sudec (Allemagne Fédérale)	45,00
M. Linhart (49)	50,00
M. Ribot (47)	20,00
S-ro Schmidt (Allemagne Fédérale)	15,00
Mme Trésorier (58)	15,00
M. Despeyroux (75)	15,00
Mlle Dessertenne (71)	15,00
Mlle Chérie (14)	15,00
M. Thiébaud (70)	15,00
M. Durand (09)	15,00
M. Raynaud (30)	15,00
M. Genuit (10)	15,00
Mme Askolovitch (75)	15,00
M. Bourquin (25)	15,00
Mme Lenel (22)	15,00
S-ro A.R. Correia (Portugal)	20,00
M. Simonnet (47)	15,00
Faculté Clermont (63)	15,00
Mlle Louys (25)	15,00
Mlle Bourot (10)	15,00
Mme Chassiau (10)	15,00
Mlle Martinot (10)	15,00
M. Labatte (80)	15,00
Mme Leriche (29)	15,00
M. Chalm (76)	15,00
M. Matzinger (67)	15,00
S-ino Zerbe (Allemagne Fédérale)	15,00
M. Kristos (63)	15,00
S-ro Rinke (Allemagne Fédérale)	45,00
M. Mouveaux (59)	15,00
M. Querlioz (69)	15,00
Mme Lauret (92)	15,00
M. Barenes (09)	15,00
S-ino Wynholds (U.S.A.)	20,00
M. Benaim (47)	15,00
M. Galeazzi (54)	15,00
Total	**1 035,00**

NOS PEINES

Mademoiselle Paulier dont tous les espérantistes avaient pu apprécier la compétence, la gentillesse et la modestie, dans ses fonctions de secrétariat à U.F.E. est décédée, le 1er août. Elle n'aura pas pu profiter d'une retraite justement méritée. Nous partageons la peine de sa famille et de ses amis.

★

En juillet, alors qu'il avait projeté de venir à Grésillon cette année encore, Monsieur André Jurquet, de Toulon est décédé. A son épouse, à nos amis, M. et Mme Bernard Jurquet et à leur famille nous donnons l'assurance de notre profonde sympathie.

PHILATELISTES

N'oubliez pas que nous tenons à votre disposition de magnifiques séries de timbres de Roumanie. Nous vous les offrons à 50 % de la cote. Envoyez 10, 20, 30 ou 50 francs à :

Monsieur Lucien Giloteaux
3/10, allée Béranger, 59170 CROIX
C.C.P. LILLE 2 269 89

DIAPOSITIVES

Nous disposons de quelques séries de diapositives sur Moscou et ses musées. Le prix en est de 20 francs pour une série de 20. Envoyez la somme à Kulturaj Kajeroj.

SERVICE - LIBRAIRIE

LIBRO-SERVO

Pour activer les livraisons, envoyez désormais vos commandes à : M. CIRET, route de la Boulerie, Vieil-Baugé, 49150 BAUGE. — Les chèques devront être libellés au nom de : Maison Culturelle Espérantiste, C.C.P. NANTES 1485 39.

Prix franco au-dessus de 8,00 Fr.

LIVRES D'ÉTUDE ET DISQUES

ABC d'esperanto (Waringhien)	4,00
Esperanto-Manuel (Warnier (avec corrigé)	9.00
Esperanto por Infanoj	3,00
Esperanto Vivant (Delaire)	32,00
Falsaj amikoj	3,50
Gvidlibro por ekzamenoj	3,00
Junulkurso (SAT-amikaro)	8,00
Junulkurso (complément)	3,00
Junulkurso : 5 disques d'accompagnement	12,00
Manuel d'Initiation (Thaillet)	2,50
Manuel d'Etude (Couteaux)	4,80
Manuel de perfectionnement (Couteaux)	4,50
Manuel de préparation à l'Atesto pri Kapableco (Ribot)	8,00
Ni parolu en Esperanto (Ribot)	6,00
Nos premiers pas en Esperanto (avec disque)	3,00
Paŝoj al Plena posedo	14,00
Por la praktikantoj (Babin)	8 50
Premier Manuel	2,00
Privilegia Vojo (Setälä)	6,50
Tra la Mondo : 6 disques, 7 livrets	86,70
disques seuls	42,00
livrets seuls	48,00

DCTIONNAIRES

Botanika Terminaro	4,00
Dictionnaire pratique (esp.-fr., fr.-esp.)	16,00
Dictionnaire français-esperanto (Léger-Albault)	23.00
Grand dictionnaire esper.-français (Waringhien)	40,00
Gvidlibro por Ekzamenoj	3,00
Lexique fondamental (Léger)	6,50
Naŭlingva etimologia leksikono (Bastien)	18 00
Plena Vortaro : malnova eldono	17,00
nova eldono	22,00
Plena ilustrita vortaro	145,00
Vocabulaire de poche (Bastien)	4,50
Vocabulaire (Duc. Goninaz)	12,00

LANGUE ET MOUVEMENT

Bona ŝanco (W. Borman)	20,00
Dialekto, dialektiko (Dalmau)	4,00
Dr Esperanto (Ziokowska) broché	7,00
relié	14,50
Elektitaj paroladoj (Lapenna)	20,00
Esperanto, fil d'Ariane (Delaire)	20,00
Fundamento de Esperanto relié	18,50
broché	14,00
Historio de la lingvo esperanto (Privat) (2 vol.)	13,00
Leteroj de Zamenhof (2 vol.)	30,00
Lingvo kaj vivo (Waringhien)	20,00
Lingvaj respondoj (Zamenhof) relié	11,00
broché	8,50
Naskiĝo de Esperanto-Domo	3,50
Planlingvaj problemoj (Gilbert)	6,00
Proverbaro esperanta (Zamenhof)	8,00
Vivo de Zamenhof (Privat)	10,00
Vojaĝo inter la tempoj (Kalocsay)	14,00
Zamenhofa Esperanto	20,00
Zamenhof (M. Boulton)	17,00
Zamenhof en sia tempo :	
Boulogne - 1905	2,60
Homaranismo	2 60
Aŭtografoj de Zamenhof	2,60

LITTÉRATURE

Amara pano (Darvas)	6,50
Aventuroj de pioniro (Privat)	10,00
Bill kaj lazuraj ekuloj (Goldoni)	4,50
Brulanta sekreto (S. Zweig)	4,00
Colomba (Mérimée)	4,00
El tero kaj etero (Pioro)	7,00
Eta princo (Saint-Exupéry)	29,00
Fabeloj de Andersen	17,50
Faraono (Prus), 3 vol.	30,00
Frisaj rakontoj	10,00
Fundamenta Krestomatio	19,00
Gaja leganto (Schwerin)	3,00
Pomoj kaj riveroj (Rosbach)	10,00
Homoj sur la tero (Engholm) **broché**	12,00
relié	16,00
Junaĝa verkaro (Privat)	7,00
Kanako el Kananam (Linton)	12,00
Karlo (Privat)	3,00
Karnavalo kaj Somnambulino (Immermann)	5,00
Kiel akvo de l'rivero (Schwartz)	20,00
Kiso de l'reĝino (Najibin)	5,00
Koloroj (Baghy)	5,00
Kombilo (Gabrielli)	4,50
Konversacia Literaturo	3,00
Malsata ŝtono (Tagore)	13,00
Maŝinmondo (Szathmari)	8,50
Marta (Orzesko - tr. Zamenhof	17,00
Martin Fiero	23.00
Marvirineto (Andersen)	12,00
Maskerado ĉirkaŭ la morto (Schwartz)	15,00
Mi amis junulinon (Trobisch)	9,00
Morto de trajno (Croft)	7,00
Naŭzo (Sartre)	19,00
Normandaj rakontoj (Maupassant)	25,00
Novaj vestoj de l'Imperiesto (Andersen)	12,00
Okuloj (Boulton)	10,00
Princo kaj Betty (Woodehouse)	3,00
Printempo de morto (Zihaly)	8,50
Romeo Julieta kaj la tenebro	10,00
Sep vangofrapoj (Aslanyi)	4,00
Specimene (Baupierre)	9,00
Taglibro de Ann Frank	16 00
Tartarin de Taraskono (Daudet)	12,00
Tempo-maŝino (Wells)	3,50
Tridek tri rakontoj	18,00
Tri verkoj de Volter	12,00
Verda raketo (Forge)	12,00
Vitralo (Francis)	8,00
Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud (Ribillard)	10,00

Vivo vokas (Engholm)		8,00
Vojaĝo al Kazohinio (Szathmari)		15,00
Vuk (Fekete)		8,00

POÉSIE — THÉATRE

Arĉoj (G. Mattos)		10,00
Ĉielarko (Baghy)		8,50
Dia Komedio (Dante)		85,00
Duonvoĉe (Maura)		8,50
Ekzilo kaj Azilo (Emba)		8,50
Esperanta antologio		21,00
Fajro sur mia lango (de Kock)		8,00
Ĝoja podio (Schwartz)		8,00
Floroj de l'malbono (Baudelaire)		14,50
Gajaj edzinoj de Windsor (Shakespeare)		3,00
Georgo Dandin (Molière)		5,00
Hamleto (Shakespeare ; trad. Newell)		15,00
Hamleto (trad. Zamenhof)		15,00
Humoroj (Auld)		10,00
Infana raso (W. Auld)		10,00
Kalevala	relié	35,00
Kantoj kaj Romancoj (Heine)		26,00
Kontralte (Boulton)		12,00
Krioj el Mallumo (Svetinov)		5,00
Libro de amo (Peneter)		25,00
Mokindaj preciozulinoj		3,00
Nova Ezopo (Urban)		7,00
Nur tri koloroj (Urbanova)		8,00
Parnasa gvidlibro		12,00
Peer Gynt (Ibsen)	relié	12,50
Pinta krajono (Rossetti)		8,00
Provo alfronti la vivon (Georgiev)		7,00
Revizoro (Gopol)		6,00
Romeo kaj Julieto (Shakespeare)		3,00
Rozoj kaj Urtikoj (Thorsen)		9,00
Sen eliro — La respektema P... (Sartre)		10,00
Sen paraŝuto (Thorsen)		8,00
Soifo (Tarkony)		14,00
Sub stelo rigila (Hamri)		8,00
Sur la vivovojo (Logvin)		9,00
Ŝtupoj sen nomoj (Ragnarsson)		8,00
Tempesto (Shakespeare)		10,00
Topaz (Pagnol)		12,00
Unufingraj melodioj (Auld)		7,00
Vesperkanto (Adamson)		9,00
Virino ĉe la landlimo (Boulton)		12,00

HISTOIRE — GÉOGRAPHIE SCIENCES — VOYAGES

Aktualaj problemoj (I. Lapenna)		10,00
Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj (Neergaard)		17,00
Bela subtera mondo (Tell)		12,00
La dolĉa Franclando		25,00
Dorse kontraŭ la muro (Wybenga)	relié	24,00
	broché	15,00
De Parizo al Lazura marbordo		3,50
Elingita glavo (Verdiro)		7,00
Gvidlibro tra Parizo (Julieta)		13,00
Kon Tiki (Heyerdahl)		20,00
Infanoj ne konas limojn		5,00
Nepalo malfermas sian pordon (Sekelj)		18,00
Nobla korano		60,00
Princlando Andoro		9,00
Rakontoj pri Nederlando (Duhamel)		5,00
Roza Luksemburg (Holst)		8,50
Tio, kion mi kredas (J. Rostand)		3,00
Vivo de Gandhi (E. Privat)		12,00

DIVERS

Gaja kantaro		2,00
Comment former un centre culturel		3,00
la série de 10 différents		10,00
Cartes postales de Grésillon	noires	0,50
	couleurs	0,60
Livres pour enfants (illustrés)		1,20

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de **P. Babin**

Prix : **8,50 F.**